

Juĝado de la gramatikeco de japanaj frazoj enhavantaj du sinsekvajn finitivajn verbojn sen konjunkcio inter ili: Ĉu valida estas la principo de Plena Interpretado de Chomsky?

Hiroshi NAGATA

Resumo

Japanlingvanoj plenkreskaj juĝis la gramatikecon de negramatikaj japanaj frazoj malobservantaj la principon de Plena Interpretado de Chomsky. La frazoj malobservis la principon tiel, ke ili enhavis du sinsekvajn verbojn finitivajn sen konjunkcio inter ili.

Du verboj estis malsamaj duflanke: pri stilo ili estis klasikaj aŭ modernaj kaj pri vortordo klasika verbo antaŭvenis aŭ postvenis la modernan. La trovaĵoj montris, ke verbordo ne havis efikon sur la juĝatan gramatikecon. Tamen, la frazoj kun du verboj finitivaj estis juĝitaj komparebla kun, kvankam statistike pli malalte ol, la gramatikaj frazoj kun nur unu verbo moderna.

La lasta trovaĵo staras kontraŭ la prognozo de la principo de Plena Interpretado.

Enkonduko

Frazoj (1) kaj (2) subaj estas respektive Esperanta kaj angla traduko de la japana frazo (3), kiu aperas en La Turo de Londono, verkita de Soseki Natsume (1905), unu el la plej elstaraj japanaj romanistoj kaj literaturistoj:

(1) Ĉio estas trankvila, enuiga kaj dormema. Impreso de l' estinteco! (Nishi, 1960, p. 11)

(2) ... *all was calm, weary, slumbering, belonging to the past.* (Milward & Nakano, 1992, p. 25)

(3) ... *subete no mono ga ŝizuka de aru, monougeni mieru, nemutte iru, mina kako no kanji de aru.* (Natsume, 2004, p. 10).

El la semantika vidpunkto, la angla traduko ŝajnas pli fidela al la originalo ol la Esperanta, escepte de la diferenco pri tenso. Tio ĉi estas pro tio, ke la Esperanta traduko dividas la originalan frazon en du partojn, "ĉio estas trankvila, enuiga kaj dormema" kaj "impreso de l' estinteco!" Tiu ĉi partigo lasas la legantojn interpreti, ke tio, kio elvokas la impreson de l' estinteco, estas la stato de ĉio, kio estas trankvila, enuiga kaj dormema, malsame al la originala frazo, kiu ordigas impreson de l' estinteco kiel la kvaran econ paralele kun aliaj tri ecoj antaŭvenintaj, trankvila, enuiga kaj dormema.

Tamen la du tradukoj estas similaj pri unu maniero plej rimarkinda: ili ambaŭ alprenas adjektivon (trankvila, enuiga, dormema, *calm*, kaj *weary*) aŭ adjektivan particon (*slumbering* kaj *belonging*), kontraste al la originalo, kiu ilin ne uzas. La originalo utiligas nek adjektivon nek adjektivan particon. Ĝi anstataŭe alprenis finitivan verbon kun prezenca tenso, kiel klare montras la kursivoj en (3). Tiuj ĉi kvar vortoj ĉiuj rilatas al unu sola subjekto *subeteno mono* (ĉiuj objektoj). Sintakse, do, la originalo estas skribebla per frazo (4), kvankam tro enuiga pro kvarfoja ripetado de la subjekto:

(4) ... *subete no mono ga ŝizuka de aru, subete no mono ga monougeni mieru, subete no mono ga nemutte-iru, subete no mono ga mina kako no kanji de aru.*

La originalo plie enhavas alian trajton interesan: ĝi ne inkluzivas konjunkcion, tute kontraste al la Esperanta traduko, al kiu la tradukinto krome donis la konjunkcion "kaj". La angla tradukinto ne aldona la konjunkcion. Tial ĉi, la angla frazo spegulas pli precize tian impreson, kian elvokas la originalo, nome, la impreson de ĉiuj objektoj antaŭ la okuloj de la verkisto, kiu povus, laŭvole, esti priskribebla senlime per pli-kaj-plia aldono de verboj.

Koncize, frazo (3) enhavas du fraztrajtojn. Ĝi unuflanke enhavas plurajn verbojn finitivajn, kiuj ĉiuj rilatas al unu sola subjekto. Aliflanke ĝi ne entenas la konjunkcion kiu fermas la sinsekvajn aperadon de finitivaj verboj, tiamaniere lasante la nombron de verboj finitivaj resti nedefinitiva. Frazoj kiel (3) povus okazi en literaturo; tamen ĉu ili estas gramatike eblaj?

Ne troviĝas lingvistika diskuto pri tiu ĉi problemo, laŭ la scio de la nuna aŭtoro. Konsidere al la senduba neebleco, ke la teorio de la genera gramatiko de Chomsky (1986, 1995, "Ĉomsko" en la sekva teksto konforme al Esperanta ortografio, escepte dum referencado) permesas senfinan aperadon de sinsekvaj verboj finitivaj, ni interpretu, ke

tiaj frazoj estas gramatike neblaj en la senco, ke ili malobservas unu el liaj sintaksaj principoj, la principon de Plena Interpretado (angle: *the principle of Full Interpretation*). La principo metas al frazo kondiĉon, ke ĉiu elemento aperanta en lingva strukturo estu interpretebla, t.e., ne troviĝu en ĝi ekstraj elementoj neinterpreteblaj.

Tiun ĉi principon oni povas kapti facile per la frazo "Johano donas libron al Karlo", kiu enhavas verbon, "donas", kun tri argumentoj, t.e., argumento kiu plenumas teman rolon de Aganto, "Johano", argumento kiu rolas kiel Temo, "libro", kaj argumento kiu rolas kiel Ricevanto aŭ Celu, "Karlo". En la angla la verbo "doni" postulas la suprajn tri argumentojn kiel neprajn por kontentigi la argumentstrukturon de la verbo. Sekve se al la frazo mankas iu aŭ alia argumento kiel, ekzemple, "donas libron al Karlo", aŭ se en la frazo aperas iu aŭ alia argumento ol tiuj supre specifitaj kiel, ekzemple, "Johano donas libron kraĵonon al Karlo", tiam ambaŭ frazoj estas forigitaj kiel negramatikaj pro ties malobservado de la principo de Plena Interpretado. La principo do postulas al frazo ne enteni argumenton aŭ argumentojn neinterpreteblajn, por ke ĉiuj elementoj de la frazo estu plenplene interpreteblaj.

Antaŭaj diskutoj pri argumentstrukturo turnis kaj turnas sian atenton nur al la nombro de argumentoj. Tio ĉi devenas eble de tio, ke argumentstrukturo estas konceptata surbaze de la verbo, nome: kiom da argumentoj kaj kiaj argumentoj akompanas apartan verbon (ekz. *Goldberg*, 1995; *Grimshaw*, 1990; *Tsujimura*, 1996; *Wechsler*, 1995). Ili do ne donas atenton al la nombro de verboj, kiuj povas aperi kune kun aparta argumentstrukturo. Ĉi-okaze, sin levas tiaj frazoj, kiajn ni menciis en la komenco de tiu ĉi artikolo. Ni premisu ankoraŭfoje, ke tiaj frazoj malobservas la principon de Plena Interpretado pro tio, ke ili inkluzivas ekstrajn verbojn ne sintakse kunligeblajn kun aliaj frazelementoj.⁽¹⁾ Provu, ekzemple, ĉu estas gramatika la frazo "Johano donas, sendas, pruntedonas, ... libron al Karlo".

Kontraŭe al tio ĉi, ekzistas unuflanke evidentaĵo, ke tiaj frazoj troviĝas aktuale, kvankam en literaturo. Aliflanke ekzistas Ĉomska fundamenta tezo mensista kaj realista, kiu insistas, ke "ĉiu parolanto de lingvo estas mastruminta kaj interniginta generan gramatikon kiu esprimas lian scion de lia lingvo" (*Chomsky*, 1965, p. 9), ke "sciado de lingvo inkluzivas internan reprezentadon de la genera proceduro kiu specifas la strukturon de la lingvo" (*Chomsky*, 1991, p. 9), kaj ke "sciado de la lingvo ... formas la bazon de aktuala uzado de lingvo

fare de parolanto-aŭskultanto" (*Chomsky*, 1965, p. 9). En la supraj citaĵoj la unua koncernas la enhavon de lingvoscio, nome: ĝi konsistas el Ĉomska genera gramatiko; la dua specifas pli subtilan lingvoscion, nome: parolantoj scias la generan proceduron formale konceptitan por konstrui, ekzemple, frazstrukturon; kaj la lasta temas pri uzado de la teorio, nome: parolantoj uzas la generan gramatikon en aktuala uzado de sia lingvo. Tiun ĉi tezon akceptas eksplicite aŭ ne multaj esploristoj (ekz. *Anderson & Lightfoot*, 2002; *Crain & Thornton*, 1998; *Jenkins*, 2000; *Radford*, 1999; *Smith*, 1999).

Tiu ĉi studo do esploras, ĉu ordinaraj parolantoj de la japana akceptas tiajn frazojn kiel gramatike ĝustajn. La esploro liveros empirian evidentaĵon, kiu sugestas, ĉu japanlingvanoj, laŭsertaj posedantoj de la principo de Plena Interpretado, observas aŭ ne observas la principon. En la nuna studo ni postulas de japanlingvanoj juĝi la gramatikecon⁽²⁾ de japanaj frazoj kiel (4):

(4) *Kangen-o moĉiite roorakuŝita, omoidoori-ni ajacutta.*⁽³⁾

Flataj-vortoj-OBJEKTO uzante-PARTICIPO delogis-VERBO, laŭdezire-ADVERBO manipulis-VERBO. Uzante flatajn vortojn, (iu)⁽⁴⁾ delogis (iun), manipulis (iun) laŭdezire.

Frazo (4) enhavas du verbojn,⁽⁵⁾ *roorakuŝita* (delogis) kaj *ajacutta* (manipulis), kiuj ambaŭ inkluzivas finitivan verbon. Ne aperas en la frazo konjunkcio inter la du verboj sed aperas komo anstataŭe. Tiu ĉi studo metas frazon (4) kontraste al frazo (5):

(5) *Kangen o moĉiite omoidoori ni ajacutta, roorakuŝita.*

Flataj-vortoj-OBJEKTO uzante-PARTICIPO laŭdezire-ADVERBO manipulis-VERBO, delogis-VERBO. Uzante flatajn vortojn, (iu) manipulis (iun) laŭdezire, delogis (iun).

La diferenco inter (4) kaj (5) temas pri la ordo de la du verboj. Tamen, tiu ĉi simpla manipulado de vortordo povus fari efikon sur la juĝadon de la gramatikeco. Tio ĉi estas pro tio, ke la du verboj malsamas je stilo; nome: *roorakuŝita* estas pli klasika ol *omoidoori ni ajacutta*, tiel ke japanlingvanoj nuntempaj ne kutimiĝas al la uzmaniero de la antaŭa verbo klasika, kontraste kun la lasta verbo moderna, kiun ili povas tuj kompreni kaj facile utiligi en ĉiutaga uzado. En la suba teksto ni nomas klasikajn verbojn klasikaj (K) kaj modernajn verbojn modernaj (M). Se povas okazi, ke en frazo (4), en kiu K-verbo aperas antaŭ M-verbo, la M-verbo rolas kiel la indikilo kiu sciigas al la legantoj kiamaniere ili interpretu la antaŭirintan K-verbon, tiam ni povus

supozi, ke K-M-verbordo estas pragmatike pli uzebila en iuj kuntekstoj ol M-K-verbordo, en kiu la unue aperinta M-verbo gramatike kaj semantike jam kompletigas la antaŭirintajn frazelementojn, sekve ĝi nuligos la postvenontan K-verbon. Eblas do, ke japanlingvanoj juĝas la K-M-frazojn gramatike pli akcepteblaj ol la M-K-frazojn. La supraĵn du frazojn, K-M-frazojn kaj M-K-frazojn, ni kontrastigas kun aliaj tute gramatikaj frazoj kiel (6), kiu inkluzivas unu solan verbon modernan:

6) *Kangen o moĉiite omoidoori ni ajacutta.*

Flataj-vortoj-OBJEKTO uzante-PARTICIPO laŭdeziro-ADVERBO manipulis-VERBO. Uzante flatajn vortojn, (iu) manipulis (iun) laŭdeziro.

Ni nomu ĉi-lastajn frazojn bazaj. En la nuna studo, ni postulas de japanlingvanoj juĝi la gramatikecon de tiuj ĉi tri specoj de frazoj. La hipotezoj testotaj estas duoblaj. Unue, laŭ la teorio de la Ĉomska genera gramatiko K-M-frazoj kaj M-K-frazoj estos ambaŭ rifuzitaj pro ties malobservado de la principo de Plena Interpretado, tiel ke la juĝita gramatikeco de tiuj du specoj de frazoj alproksimiĝos al la nivelo de plena negramatikeco, konforme al la Ĉomska teorio, kiu apartigas frazojn, laŭ la maniero de ĉio-aŭ-nenio, en du arojn de gramatikaj kaj negramatikaj frazoj. Due, se validas nia rezonado pri la ordigo de klasika kaj moderna verboj, K-M-frazoj estos juĝitaj kiel pli gramatikaj ol M-K-frazoj.

Metodo

Elektado de verboj

Dek kvin verboj klasikaj kaj 15 frazoj enhavantaj la respektivan verbon estis elektitaj el *Shibata & Yamada* (2002). Dek kvin verboj modernaj estis tiuj, kiuj ankaŭ aperis tie kiel ekvivalentoj de la klasikaj verboj (6). Okaze de la elektado de la verboj klasikaj ni estis zorgemaj, por ke ili estu laŭeble ne sciitaj de la partoprenontoj en tiu ĉi esploro. Enketo donita al 34 japanlingvanoj (6 viroj kaj 28 virinoj: mezaĝo = 20.0 jaroj) konfirmis tion ĉi. Specife, duono el ili juĝis 15 frazojn kun 8 klasikaj verboj kaj 7 modernaj verboj kaj alia duono 15 frazojn kun 7 klasikaj verboj kaj 8 modernaj verboj, kondiĉe ke la aliaj frazelementoj antaŭvenintaj ol la verboj estis identaj. Ĉiuj lingvanoj juĝis la 15 frazojn per la metodo de grandeco-taksado (angle: *magnitude estimation*) laŭ du juĝkriterioj, nome: kiel ofte ili renkontas la verbojn (ofteco, ekvivalento de angla termino *familiarity*) kaj kiom memfide ili povas precizigi la signifon de la verboj (memfido,

ekvivalento de angla termino *confidence*). Mezvaloroj [$\log(X+1)$] de ofteco estis 1.12 (SD1 = .36, SD2 = .18) pri la klasikaj verboj kaj 1.99 (SD1 = .11, SD2 = .14) pri la modernaj verboj (7). La respektivaj mezvaloroj pri la memfido estis 1.33 (SD1 = .30, SD2 = .23) kaj 2.01 (SD1 = .06, SD2 = .09). Sendependaj t-testoj montris signifikan diferencan inter la du mezvaloroj pri ofteco [$t_1(18) = 9.07, p < .001, t_2(28) = 14.22, p < .001$] kaj inter tiuj pri memfido [$t_1(17) = 8.95, p < .001, t_2(17) = 10.46, p < .001$]. Analizoj do indikis, ke atributoj de la verboj estis bone manipolitaj.

Stimulaj frazoj

Dek kvin frazoj trafaj kaj 30 frazoj senrilataj estis preparitaj. La lastaj frazoj uzitaj por maski la fraztraĵojn de la trafaj frazoj, konsistis el 15 gramatikaj kaj 15 negramatikaj frazoj. La trafaj frazoj konsistis el la tri specoj de frazoj supre menciitaj, t.e., bazaj, K-M-frazoj kaj M-K-frazoj (vd. Tabelon 1 pri ekzemplaj frazoj).

Ekzemplo 1

(Baza frazo) Daigakuinsei ga tanin no ronbun o *jibun no mono to ŝite happjooŝita*. (La studento por doktoreco publikigis mallojale la artikolon de alia persono kiel sian propran.)

(K-M-frazo) Daigakuinsei ga tanin no ronbun o *hjoosecuŝita, jibun no mono to ŝite happjooŝita*. (La studento por doktoreco plagiatas la artikolon de alia persono, publikigis mallojale ĝin kiel sian propran.)

(M-K-frazo) Daigakuinsei ga tanin no ronbun o *jibun no mono to ŝite happjooŝita, hjoosecuŝita*. (La studento por doktoreco publikigis mallojale la artikolon de alia persono kiel sian propran, plagiatas ĝin.)

Ekzemplo 2

(Baza frazo) Aite no seiŝicu o *komakai tokoro made ŝitteiru*. ((Mi) scias ĝisdetale la karakteron de la kunulo.)

(K-M-frazo) Aite no seiŝicu o *ĉiŝicuŝiteiru, komakai tokoro made ŝitteiru*. ((Mi) havas plenplene ekzaktan scion pri la karaktero de la kunulo, scias ĝisdetale lian/sian karakteron.)

(M-K-frazo) Aite no seiŝicu o *komakai tokoro made ŝitteiru, ĉiŝicuŝiteiru*. ((Mi) scias ĝisdetale la karakteron de la kunulo, havas plenplene ekzaktan scion pri ĝi.)

Tabelo 1. Trafaj frazoj ekzemplaj

(Grasliteraj vortoj estas klasikaj verboj, dum kursivaj estas modernaj. La esperantaj tradukoj estas tre malstriktaj, kiuj do ne spegulas la frazstrukturon de la japana originalo. La vortoj en parentezoj estas provizoraj, ĉar ili estas anstataŭigeblaj laŭkuntekste per aliaj vortoj.)

La 30 frazoj senrilataj estis tiuj, kiuj estis uzitaj en antaŭaj studoj (Nagata, 2003, 2004).

Partoprenantoj

Partoprenis dudek naŭ studentoj de *Kawasaki University of Medical Welfare* (12 viroj kaj 17 virinoj), kies meza aĝo estis 18.7 jaroj. Ili ĉiuj estis denaskaj parolantoj de la japana.

Proceduro

La partoprenantoj ricevis foliaron kun kvar paĝoj. La unua paĝo klarigis kiamaniere oni juĝu ĉiun frazon per la uzado de 7-poenta skalo, kaj prezentis du frazojn por ekzercado, unu gramatikan kaj alian negramatikan. Sur la paĝoj ekde 2 tra 4 estis prezentitaj 15 trafikaj frazoj kaj 30 senrilataj frazoj, hazarde miksitaj inter si, kune kun la skalo.

La 15 trafikaj frazoj estis dividitaj en tri grupojn de kvin frazoj por konstrui tri malsamajn versiojn de 45 frazoj, 15 trafikaj kaj 30 senrilataj. Tri grupoj de kvin frazoj kaj la tri versioj estis kombinitaj, por ke la 15 trafikaj frazoj aperu unu fojon en ĉiu versio. Nome, en la unua versio aperis la unua grupo de kvin trafikaj frazoj en baza formo, la dua grupo de ili en K-M-formo, kaj la tria en M-K-formo. En la dua versio la unua grupo de la kvin trafikaj frazoj aperis en K-M-formo, la dua grupo aperis en M-K-formo kaj la tria en baza formo, ktp. Ĉi-maniere, ĉiu partoprenanto ricevis la 15 trafikajn frazojn tri foje tra la tri versioj: unu fojon en baza formo, alian fojon en K-M-formo kaj trian fojon en M-K-formo. Kiu versio aperu sur kiu paĝo estis hazarde determinita.

La partoprenantoj juĝis ĉiun frazon laŭ la gramatikeco, t.e., laŭ la konformeco al gramatika ĝusteco de la japana lingvo. Ili juĝis la frazojn per la skalo kun 7 gradoj. Se ili rigardis frazon kiel plej gramatikan, ili donis al ĝi la numeron 7; se ili rigardis ĝin kiel malplej gramatikan, ili donis al ĝi la numeron 1; kaj se ili rigardis ĝin kiel pli aŭ malpli gramatikan inter numeroj 2 kaj 6, ili tiam donis al ĝi laŭgrade tiun numeron, kiun ili konsideris kiel plej taŭgan. La instrukcio emfazis, ke ili juĝu ĉiun frazon senhezite, laŭ sia unua impresio.

Rezultoj

Ni unue taksis la influon de ripetita prezentado, tra tri paĝoj, de la senrilataj frazoj sur ties juĝitan gramatikecon. Tabelo 2 montras la

mezvalorojn de juĝita gramatikeco de la senrilataj frazoj gramatikaj kaj negramatikaj.

Frazoj		Paĝo 1	Paĝo 2	Paĝo 3
Gramatikaj	Mezo	6.12	6.28	6.42
	SD1	.68	.70	.62
	SD2	.70	.47	.45
Negramatikaj	Mezo	1.29	1.30	1.26
	SD1	.38	.56	.46
	SD2	.18	.13	.10

Tabelo 2. Mezvaloroj kaj SD pri juĝita gramatikeco de senrilataj frazoj (1 = plej negramatika, 7 = plej gramatika)

Ni aplikis analizon de varianco (angle: *analysis of variance*) kun tri niveloj (paĝoj 1, 2 kaj 3), en kiu paĝo estis traktita kiel ripetita mezuro (angle: *repeated measure*). La diferenco inter du mezvaloroj estis komparitaj pere de *Tukey* HSD-testo ($p < .05$). Ne aperis diferencoj statistike signifika pri la negramatikaj frazoj. Tamen aperis diferencoj pri la gramatikaj frazoj, $F_1(2, 56) = 6.74$, $p < .01$, $F_2(2, 28) = 8.02$, $p < .01$, tiel ke la juĝita gramatikeco estis pli alta sur paĝo 3 ol sur paĝo 1. Tiu ĉi troviĝo, tamen, havas neniun influon sur la sekvantaj interpretadoj de la rezultoj pri la trafikaj frazoj, ĉar la tri grupoj de kvin trafikaj frazoj estis manipolitaj, por ke ili aperu laŭeble plej ofte en ĉiu el la tri versioj, nome, tri paĝoj.

Tabelo 3 prezentas la juĝitan gramatikecon de la trafikaj frazoj. Analizo de la varianco kun tri niveloj (frazoj: baza, K-M kaj M-K) montris signifikan diferencan por la frazoj $F_1(2, 56) = 7.89$, $p < .01$, $F_2(2, 28) = 5.51$, $p < .01$, tiel ke juĝita gramatikeco de la bazaj frazoj estis pli alta ol tiu de la aliaj du specoj de frazoj pere de *Tukey* HSD-testoj ($p < .05$). Ne aperis tamen signifika diferenco inter la K-M-frazoj kaj la M-K-frazoj.

	Bazaj frazoj	K-M-frazoj	M-K-frazoj
Mezo	5.70	5.31	5.23
SD1	.84	1.21	1.18
SD2	.90	.48	.52

Tabelo 3. Mezvaloroj kaj SD pri la juĝita gramatikeco de trafikaj frazoj (1 = plej negramatika, 7 = plej gramatika)

Diskuto

Du ĉefaj trovaĵoj estas akiritaj en tiu ĉi esploro. La unua trovaĵo estas, ke la bazaj frazoj estis pli altaj ĉe la juĝita gramatikeco ol la K-M-frazoj kaj la M-K-frazoj. Tio ĉi fakte subtenas la Ĉomskan principon de Plena Interpretado. Tamen la juĝita gramatikeco de la du lastaj frazoj ne alproksimiĝis al la plej malalta valoro de 1, sed anstataŭe ili montris mezvalorojn tre similajn al la mezvaloro de la bazaj frazoj. Multe pli klara estas, do, la granda apartiĝo de la mezvaloroj de la K-M- kaj la M-K-frazoj disde la plej malalta valuto de 1 ol la diferenco inter tiuj ĉi du frazoj kaj la bazaj. La principo de Plena Interpretado malakceptas derivadon de tiuj du specoj de frazoj pro tio, ke la due aperinta verbo finitiva ne povas sin kunligi sintakse kun antaŭirintaj frazelementoj. Laŭ *Chomsky* (1995), sintaksa derivado de frazo progresas laŭ ĉio-aŭ-nenio-maniero: ĝi sukcesas se kontentiĝas iuj aŭ aliaj sintaksaj trajtoj okaze de kunligado de du konstituentoj por formi unu pli grandan konstituanton, dum ĝi malsukcesas se ili ne kontentiĝas. Tiurilate, la principo ne povas antaŭsupozi la mezvalorojn tiom altajn, kiajn montris la K-M- kaj la M-K-frazoj.

Chomsky (1991) asertas, ankoraŭfoje, ke "sciado de lingvo inkluzivas internan reprezentadon de *genera proceduro* kiu specifas la strukturon de la lingvo" (p. 9, kursivoj aldonitaj). *Crain & Thornton* (1998) mencias, ke "se infanoj scias lingvan principon, ili tiam devas konduti en la maniero konforma al la principo, ĝuste kiel kondutas *plenkreskuloj*" (p. 55, kursivoj aldonitaj) kaj "devas konsekvence rifuzi frazojn negramatikajn kaj akcepti frazojn gramatikajn" (p. 55). Metu la suprajn konvinkojn kontraŭ la nuna trovaĵo: japanlingvanoj ne plene rifuzis la K-M- kaj la M-K-frazojn kiel negramatikajn sed anstataŭe juĝis ilin relative alte pri gramatikeco. Staras nun la demando: kial do okazis tia malegaleco inter la lingvoscio asertita de ili kaj la aktuala plenumado observita tie ĉi. Iuj eble asertas, kiel tiuj esploristoj (vd., ekz., *Chomsky*, 1965; *Newmeyer*, 1983; *Chien & Wexler*, 1990; *Grimshaw & Rosen*, 1990; *Epstein, Flynn & Martohardjono*, 1996; *Smith*, 1999), ke aliaj faktoroj ol la lingvoscio kiuj influas aktualan plenumadon, malhelpas la aperadon de la vera stato de la lingvoscio. Tamen oni ne devas tuj turni sin al tiuj ĉi faktoroj sendisipline en maloportuna okazo. Tio ĉi estas unue pro tio, ke tiaj faktoroj ankoraŭ ne estas specifitaj tiomgrade ke ili estas submeteblaj al scienca konfirmado, kaj due pro tio, ke la asertita stato de la lingvoscio, antaŭ ĉio, ankoraŭ ne estas elmontrita kiel reale ekzistanta, sed

ĝi eĉ nun estas nura *postulo* ⁽⁸⁾ *metodologia* ⁽⁹⁾, kiun alprenis Ĉomsko kiam li komencis alpreni mensistan starpunkton rilate al sia genera gramatiko (vd. *Nagata*, 2005a, 2005b, 2007, pri detalo). La asertita stato de la lingvoscio, ni devas emfazi, estis elfarita kiel ontologie reala nur el "logikaj konsideroj" (*Tomasello*, 1999, p. 50). Ĝi ankoraŭ ne estas submetita al serioza esplorado, nek konfirmita de empiriaj evidentajtoj.

La dua trovaĵo de tiu ĉi esploro temas pri la neefikeco de vortordo de du verboj finitivaj en juĝita gramatikeco, nome: ne troviĝis signifi-fika diferenco inter K-M-frazoj kaj M-K-frazoj. Ni antaŭsupozis, ke kvankam ili ambaŭ estas negramatikaj, K-M-frazoj povus esti juĝotaj kiel pli gramatikaj ol M-K-frazoj ĉar en la antaŭaj frazoj modernaj verboj rolus kiel indikilojn por interpreti klasikajn verbojn malbone konatajn al la partoprenantoj, dum en la lastaj frazoj ne okazos tia situacio. Tamen antaŭsupozo tiu ĉi ne estis konfirmita.

Unu rimarkon eble rilatantan al la neefikeco de vortordo ni devas aldoni pri la testfrazoj uzitaj en tiu ĉi esploro. Ili enhavis la du verbojn finitivajn, unu konatan al la partoprenantoj kaj alian malbone konatan. Supozu, ke la partoprenantoj estis ignorintaj la verbojn ne bone konatajn kaj juĝintaj la gramatikecon de la testfrazoj nur surbaze de la konataj verboj, nome: ili estus interpretintaj la testfrazojn kvazaŭ ili estus entenintaj unu solan verbon, sendepende de la vortordo de la verboj. Tiu ĉi maniero de interpretado ebligus plialtigi la nivelojn de la juĝita gramatikeco de K-M-frazoj kaj M-K-frazoj tiomgrade, ke ili alproksimiĝu al la nivelo de bazaj frazoj. Tiu ĉi supozo do asertas, ke niaj partoprenantoj estis interpretintaj la testfrazojn kiel ne konsistantajn el du verboj finitivaj sed konsistantajn anstataŭe el nur unu finitiva verbo. Necesas pli da esploro por konfirmi tiun ĉi interpretadon alternativan per la uzado de testfrazoj, kiuj inkluzivas du finitivajn verbojn, ambaŭ bone konatajn al japanlingvanoj.

Ni komencis tiun ĉi artikolon per prezentado de japana frazo kiu en si enhavas kvar verbojn finitivajn sed ne konjunkcion inter la lasta verbo kaj la antaŭlasta. Ĉar tiu ĉi frazo aperis en literatura verko kaj ĉar ĝi malobservas la Ĉomskan principon de Plena Interpretado, ni provis konfirmi, ĉu ankaŭ nuntempaj japanlingvanoj juĝas frazojn enhavantajn du finitivajn verbojn sed ne konjunkcion inter ili kiel gramatike akcepteblajn. La trovaĵoj montris, ke tiajn frazojn ili certe juĝis kiel malpli gramatikajn ol gramatikajn frazojn kun unu finitiva

verbo. Tamen, la juĝita gramatikeco de la antaŭaj frazoj estis multe pli alta ol la nivelo de plena negramatikeco, tute kontraŭe al la principo kiu prognozas, ke tiaj frazoj alproksimiĝu al la plena negramatikeco.

Notoj

(1) Dubinde estas ankaŭ, ĉu eĉ la nuntempa Ĉomska *Minimalist Program* (Minimumigista Programo) ebligas al tia frazo sin derivi pere de la sintaksa operacio de *Merge* (operacio kombini iun konstituanton kun alia konstituantto, kreante unu pli grandan kaj superan konstituanton kiu inkluzivas la du malsuperajn).

(2) Kvankam *Newmeyer* (1983, p. 51) asertas, ke juĝado de la gramatikeco estas koncepte erariga, ĉar la koncepto de gramatikeco estas teoria estaĵo ne submetebla al lingva intuicio de lingvoparolantoj, ni tamen alprenis tie ĉi juĝadon de "gramatikeco" anstataŭ juĝado de "akceptebleco." Vd. *Nagata* (2005b) pri nia raciigo de tiu ĉi alpreno. Vd. ankaŭ *Chomsky* (1957, p. 13), kiu mem egaligis gramatikecon kun akceptebleco. En la nuna teksto, tamen, ambaŭ konceptoj estas uzitaj laŭkuntekste.

(3) Streketo estas aldonita por ke oni povu facile kompreni la interrilaton inter la japanaj vortoj kaj ties glosoj. Ekzemple, en *kangen-o* *kangen* respondas al flataj vortoj kaj la partikulo -o al -OBJEKTO.

(4) La konstituantto en la parentezoj ne estas specifita. En la japana, iu estas anstataŭigebla per aliaj konstituanttoj kiel mi, ni aŭ aliaj. Kiu konstituantto estas elektota dependas nur de kunteksto, lingva aŭ nelingva, en kiu okazas la frazo.

(5) Nur por faciligi priskribadon, ni uzos en tiu ĉi teksto verbon kiel mal-longigitan esprimon, kiu inkluzivas ankaŭ verbsintagmon. Ĉi tio aplikigas ankaŭ al aliaj vortspecoj, inkluzive adverbon.

(6) Sekvas dek kvin finitivaj verboj uzitaj. La unua ero de triopo estas klasika verbo, la dua moderna, kaj la tria ties malstrikta traduko, kiu ignoras la subtilan diferencon inter la klasika kaj la moderna verboj. (1) *suibansareta* – *suikjosareta* - estis elektita; (2) *hootekiŝita* - *uĉisuteta* - forlasis; (3) *kanjoosuru* – *jukkurito jaŝinai sodateru* - kulturadas; (4) *roorakuŝita* - *omoidoori ni ajacutta* – delogis; (5) *fukujoo suru* - *kokoro ni todomete ŭasurenai joo ni surū* - provas memori kaj ne forgesi; (6) *ŝooganŝita* - *ŝoomiŝita* - gustumis; (7) *oioicuŝiteiru* – *afureteiru* - estas plenplena; (8) *ĉiŝicuŝiteiru* - *komakai koto made ŝiteiru* - scias ĝisdetale; (9) *hjoosecuŝita* - *jibun no mono to ŝite happjooŝita* - publikigis mallojale la artikolon de alia persono kiel sian propran; (10) *ŝoaoisareta* – *tokubecu ni kaŭaigarareta* - estis speciale amata; (11) *engesuru* - *nomikudasu* – englutis; (12) *reibasareta* - *mikudaŝite nonoŝirareta* - estis rigardata senvalora kaj insultata; (13) *sooseiŝiteiru* - *muragatte haeteiru* - dense kreskas; (14) *baŝŝooŝita* – *aĉikoĉi to aruki maŭatta* - trairis tien kaj tien ĉi; (15) *ŝinginsuru* - *kuruŝinde unaru* - ĝemas.

(7) Analizoj raportitaj en tiu ĉi esploro estas faritaj dumaniere: unu maniero estas pere de stimulaĵ materialoj kun partoprenantoj traktataj kiel hazarda varianto (SD1, t1, F1), kaj alia pere de partoprenantoj kun stimulaĵ materialoj traktataj kiel hazarda varianto (SD2, t2, F2).

(8) La saman vidpunkton pri la postulo en tiu ĉi senco prezentas *Devitt* (2006, p. 71).

(9) Ni elprenis la esprimon, metodologie, el *Huck & Goldsmith* (1995). Ili uzis ĝin kiam ili priskribis la Ĉomskan hipotezon pri denaskismo de lingvokiro tiamaniere, ke "ĝi (hipotezo de denaskismo) entenas pli metodologian strategion ol propozicion pri la demando kio estas denaska" (p. 25, parentezoj aldonitaj). Tiu ĉi strategio, ni kredas, aplikeblas senpere al lia aserto pri lia genera gramatiko, kiun li rigardas ĝuste kiel la lingvoscion posedatan de lingvoparolantoj.

Referencoj

Anderson SR & Lightfoot DW (2002). The language organ: Linguistics as cognitive physiology. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Chien Y-C & Wexler K (1990). Children's knowledge of locality conditions in binding as evidence for the modularity of syntax and pragmatics. *Language Acquisition*, 1, 225-295.

Chomsky N (1957). *Syntactic structures*. The Hague: Mouton.

Chomsky N (1965). *Aspects of the theory of syntax*. Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky N (1986). *Knowledge of language: Its nature, origin and use*. New York: Praeger.

Chomsky N (1991). Linguistics and adjacent fields: A personal view. En A Kasher (red.): *The Chomskyan turn* (pp. 3-25), Oxford: Blackwell.

Chomsky N (1995). *The minimalist program*. Cambridge, MA: MIT Press.

Crain S & Thornton R (1998). *Investigations in universal grammar: A guide to experiments on the acquisition of syntax and semantics*. Cambridge, MA: MIT Press.

Devitt M (2006). *Ignorance of language*. Oxford: Oxford University Press.

Epstein SD, Flynn S & Martohardjono G (1996). *Second language acquisition: Theoretical and experimental issues in contemporary research*. Behavioral and Brain Sciences, 19, 677-758.

Goldberg AE (1995). *Construction: A construction grammar approach to argument structure*. Cambridge, Mass: MIT Press.

Grimshaw J (1990). *Argument structure*. Cambridge, Mas: MIT Press.

Grimshaw J & Rosen ST (1990). Knowledge and obedience: The developmental status of the binding theory. *Linguistic Inquiry*, 21, 187-222.

Huck GJ & Goldsmith JA (1995). *Ideology and linguistic theory: Noam Chomsky and the deep structure debates*. London: Routledge.

Jenkins L (2000). *Biolinguistics: Exploring the biology of language*. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Milward P & Nakano K (1992) The Tower of London. Brighton, UK: In Print Publishing. Traduko de London-Too verkita de S Natsume.

Nagata H (2003). Judgments of grammaticality of Japanese sentences violating the principle of Full Interpretation. *Journal of Psycholinguistic Research*, 32, 693-709.

Nagata H (2004) Faulty Japanese sentences are judged more grammatical when punctuation is used: Negative implications for Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 99, 325-336.

Nagata H (2005a) Deveno de denaskismo pri lingvoakiro de Chomsky. *Scienca Revuo*, 56, 81-86.

Nagata H (2005b) Konstanta stato kiel lingvoscio ĉe Chomsky: Ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma? *Scienca Revuo*, 56, 127-136.

Nagata H (2007) Kunekzisto de formalismo kaj mensismo/realismo en la genera gramatiko de Chomsky: Kaŭzanto de teoriaj debatoj. *Scienca Revuo*, 58, 99-110.

Natsume S (1905) London-too. 74-a preso en 2004. Tokio: Shinchosha.

Newmeyer FJ (1983) *Grammatical theory: Its limits and its possibilities*. Chicago, IL: University of Chicago Press.

Nishi S (1960) La Turo de Londono. Tokio: JEI. Traduko de London-Too verkita de S Natsume.

Radford A (1999) *Minimalist syntax: Exploring the structure of English*. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Shibata T & Yamada S (2002) *Ruigo daijiten* [Granda vortaro de sinonimoj.] Tokio: Kodansha.

Smith N (1999) *Chomsky: Ideas and ideals*. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Tomasello M (1999) *The cultural origin of human cognition*. Cambridge, MA: Harvard University Press.

Tsujimura N (1996) *An introduction to Japanese linguistics*. Oxford, UK: Blackwell.

Wechsler S (1995) *The semantic basis of argument structure*. Stanford, CA: Center for the Study of Language and Information.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– Lingvosistemo kaj gramatiko –

Gerald TUCKER

Ni jam konstatis (SR 2/2008) ke la analizo de la relativa malfacileco de ses gravaj hindeŭropaj celloj sur la kampoj de fonologio, ortografio kaj intonacio rezultigas por turka lernanto jenan rangordon (1 = plej facila, 6 = plej malfacila):

1. Esperanto
2. hispana
3. rusa
4. germana
5. franca
6. angla

Tio estas nur ero de la vero. Post pritrakto de la rolo de tiuj (konfesinde tre gravaj) akcesoraĵoj de la lingvo, necesas reveni al la fundamentaj elementoj de lingvoj el la elira kaj celaj lingvoj – la **lingvosistemo**, la **leksiko** kaj la **sintakso**. Necesas tiurilate konstati ke tiu divido validas por ambaŭ lingvofamilioj – la tjurka kaj la hindeŭropa. Se tia trio estas tro simpla por la (almenaŭ germanaj, sed ne nur) filologoj, la kaŭzo estas ke dominas ĉe ili la imago ke „komunikado estas parta aspekto de kulturo“ (Bavara Edukministerio). Pro tio ili ofte neas la prioritaton de la komunikado en la instruado de modernaj lingvoj.

Lingvo fundamente estas plialtigo de komunikaj kapabloj surbaze de la evoluinteco de la parolorganoj, kiuj estas esenca eco de la homa estaĵo. Sekve, kulturo estas plialtigita formo de komunikado, sen lingvo ebla, sed per lingvo rafinebla. Kulturo sen lingvo estas nur socia interagado. Modernaj lingvoinstruaj didaktikistoj tial establis la komunikan prioritaton de lingvoinstruado. La malakcepto de tiu principo en superaj lernejoj kaŭzis ĉe lernantoj komunikajn mankojn, tiel ke ili ofte parolas pli **pri** iu lingvo ol **en** tiu lingvo kaj tamen bezonas tradukiston aŭ interpretiston en ĉiutagaj praktikaj situacioj.